

## *La Darmapado*

nove tradukis el la palia originalo: **Victor Sadler**  
kontrolis kaj korektis: cejlona sanghano **Njanasatta Thero**

### **Unua Parto - Parkontraŭoj**

1. Penso gvidas mensostatojn,  
penso ĉefas, originas;  
se malpacapense iu  
aŭ parolas aŭ kondutas,  
tiun do sufero sekvas,  
kiel reado bovpedon.
2. Penso gvidas mensostatojn,  
penso ĉefas, originas;  
se trankvilapense iu  
aŭ parolas aŭ kondutas,  
tiun nepre ĝojo sekvas,  
kiel ombro neforpasa.
3. "Li min batis kaj insultis,  
li min venkis kaj priŝtelis";  
kiuj tiel koleradas,  
tiuj jam ne repaciĝas.
4. "Li min batis kaj insultis,  
li min venkis kaj priŝtelis";  
kiuj tiel ne koleras,  
tiuj plene repaciĝas.
5. Per malpaco ja neniam  
la kolero kvietiĝas,  
sed per paciĝemo sole;  
jen malnova vivprincipo.
6. Aliuloj ne komprenas,  
ke nin ĉiam bridi endas;  
sed se iuj jes komprenas,  
tiel ĉesas ties luktoj.
7. Plezurojn avideman homon,  
siajn sensojn ne bridantan,

pri manĝado nemoderan,  
malaktivan, neageman,  
tiun ja subigas morto,  
kiel vento arbon etan.

8. Plezuraĵojn neavidan homon,  
siajn sensojn jes bridantan,  
pri manĝado modereman,  
fidan kaj obstine-streban,  
ja tiun ne subigas morto,  
kiel vento rokan monton.
9. Se ne sen malpuro iu  
alprenos flavan sanghan veston,  
sen memrego kaj sen vero,  
li flavan veston ne meritas.
10. Kiu lasis for malpuron,  
bonmorale firmiĝinta,  
kun memrego kaj kun vero,  
li flavan veston ja meritas.
11. Kiuj falson vero kredas,  
veron falso konsideras,  
tiuj veron ne alvenas,  
el paŝtejo de miscelo.
12. Kiuj veron vero scias,  
kaj malveron ja malvero,  
tiuj veron jes alvenas,  
el paŝtejo pravacela.
13. Kiel domon miskovritan  
pluvofalo enpenetras,  
tiel menson senkulturan  
dezirego enpenetras.
14. Kiel domon bonkovritan  
ne penetras pluvofalo,  
tiel menson kulturitan  
ne enpenetras dezirego.
15. Veas tie ĉi kaj veas transe,  
lamentas ambaŭloke misfarulo.  
Li veas kaj li afliktiĝas,  
konstatante fiagadon sian.

1. Ĝojas tie ĉi kaj ĝojas transe,  
en ambaŭ lokoj bonfarinto ĝojas.  
Li ĝojas, ja li ege ĝojas,  
konstatante agopuron sian.
2. Veas tie ĉi kaj veas transe,  
en ambaŭ lokoj misfarulo veas;  
“Mi mise agis”, li lamentas;  
eĉ pli veas li, ve-lokon ire.
3. Ĝojas tie ĉi kaj ĝojas transe,  
en ambaŭ lokoj bonfarinto ĝojas;  
“Mi bone agis”, li priĝojas;  
eĉ pli ĝojas li, bonstaton ire.
4. Se multe tripitakon li citadas,  
sed ne laŭfaras, malatenta homo,  
kiel paŝtisto nombras alies brutojn,  
ne partoprenas sanghan virton.
5. Se tripitakon li nur iom citas,  
sed de la dharmo sekvas reglaron,  
avidemon, pekon, stulton forlasante,  
liberiĝinta mense pravascia,  
ne alkroĉiĝanta, tie ĉi aŭ transe,  
do tiu partoprenas sanghan virton.